

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

| | | |
|-------------------------------------|-----------------------------------|-----------------|
| Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS | 6, rue de Mézières | 75006 PARIS |
| Sekr: F-ino G. PREUX | 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. | 59290 WASQUEHAL |
| Kasistino: S-ino J. VINCENTI | L ^o Oazo B. P. 54 | 49150 BAUGE |
| Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON | 7, av. Salomon | 59000 LILLE |
| Peranto I.K.U.E.: P-ro R. DEGRELLE | B. P. 23 | 54510 TOMBLAINE |

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n^o: 6 F. Abona: 23 F (TTC). Kotiza: 7 F. Sumo: 30 F. ====

www

N.B. La materialon por la bulteno ni sendu al S-ino Vincent nepre
antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

www

==== N^o 152 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1987 ====

www

BILETO DE LA PREZIDANTO

L' Esperanto a 100 ans. En 1887, un jeune médecin de 27 ans, le Docteur Zamenhof, proposait au monde le fruit de son travail et de son génie: une langue auxiliaire internationale. Dans sa Pologne natale, dans sa ville même, quatre communautés vivaient en hostilité réciproque: russes, polonais, allemands et juifs vivaient enfermés dans leurs coutumes et leur langage, cultivant une haine réciproque. Sentant au plus profond de lui-même que la difficulté de communiquer était l' une des causes de l' incompréhension et des tensions entre les communautés ethniques et culturelles, il avait dès sa jeunesse consacré ses efforts à l' élaboration de cette oeuvre géniale.

Dès la première publication du premier ouvrage, il recueillait l' adhésion de fidèles dont le rôle ne fut pas mince, car ils furent les premiers expérimentateurs de la pratique d' une langue destinée à être utilisée dans le monde entier.

En 1905, réunis pour la première fois en un même lieu, à Boulogne-sur-Mer, plusieurs centaines d' espérantistes, venus de plusieurs dizaines de pays, éprouvaient la joie de se comprendre mutuellement et de suivre sans effort les discours et les échanges personnels. L' année suivante, à Genève, 800 participants, en 1907, à Cambridge, 1400, un nombre croissant jusqu' en 1914, témoignaient d' une progression, interrompue, hélas, par le grand conflit mondial, qui a fait tant de tort à ce mouvement et l' a privé de beaucoup de ses pionniers. De 1920 à 1939, puis après la seconde guerre, le mouvement a retrouvé sa vitalité, et il s' est développé dans des régions plus ouvertes au développement et aux contacts qu' au début du siècle.

Si nous soulignons ici le rôle des congrès, nous voulons évoquer l' événement qui nous touche de plus près: en 1905, au cours du congrès de Boulogne, un prêtre français, Emile Peltier, devant l' ensemble des congressistes, prononça quelques phrases d' une importance majeure, dont voici quelques extraits:

../...

"... nos coeurs sont remplis de sentiments fraternels... notre vœu est que, par l'Esperanto, les membres des diverses religions fraternisent... qu'ils s'unissent entre eux pour collaborer à l'œuvre de fraternité universelle..."

Espérantiste dès 1901, entré en relation avec d'autres prêtres étrangers, E. Peltier avait entrepris en 1903, sous la rubrique "Espero Katolika", de publier dans le journal catholique "l'Aube" une page consacrée à la langue internationale, puis avait conservé ce titre pour créer une revue mensuelle qui n'a cessé d'exister depuis lors, sauf lorsque les conflits mondiaux en ont rendu la publication impossible. Lors de la fondation de IKUE par l'abbé Richardson, la revue est devenue l'organe officiel de cette société.

Le XX^{ème} siècle qui va vers sa fin a vu la transformation de la vie des personnes et des sociétés; les découvertes et les inventions ont bouleversé, sur le plan matériel, les échelles de valeurs. Les nouveaux moyens de communication, les voyages de plus en plus rapides et de plus en plus faciles ont rétréci le monde dont les moyens audiovisuels nous ont rendu les images familières. Mais l'humanisme a-t-il progressé?

On peut s'étonner de ce que cette évolution unique dans l'histoire ait fait si peu de place aux contacts humains directs, et que notre langue qui peut en être l'un des plus efficaces supports n'ait pas conquis sa place légitime auprès des instances officielles qui ont sans cesse recours à des moyens coûteux et complexes pour échanger leurs contributions à la marche du monde, dans des assemblées ou des entretiens, où des dizaines de "langues de travail" mobilisent tout un arsenal de moyens et une armée de traducteurs. Il en est de même dans notre Eglise, soumise aux mêmes servitudes au cours de ses conciles ou synodes.

Il faut le reconnaître, l'Esperanto est encore à l'âge des pionniers, nous avons un combat pacifique à conduire, en le pratiquant pour nous-mêmes, par la parole, l'écrit, la lecture, au service des causes qui nous sont chères, mais aussi en montrant ses ressources, en réclamant son enseignement dans nos écoles, en pénétrant dans les moyens d'information du public, et surtout en intéressant la jeunesse du monde à la correspondance et aux rencontres sans frontières, surtout sans frontières de langues.

R. Cl. COLAS

RESUMO

1887-1987. Esperantistoj de la tuta mondo festas la centjaram datrevenon de la publikigo fare de D-ro Zamenhof de la lingvo internacia, prilaborita dum jaroj, dum multaj tagoj de post lia juneco. Jam de tiu unua publikigo, Esperanto vekis intereson kaj entuziasmon ĉe multaj homoj el diversaj landoj. Tiu unua adeptoj ludis gravan rolon, ĉar ili provis kaj spertis la ecojn de tiu lingvo destinita al la disvastigo en la tutan mondon.

En 1905, ĉe la franca urbo Boulogne-sur-Mer, pluraj centoj da esperantistoj, el pluraj dekoj da nacioj, kongresis kaj konstatis la taŭgecon de la lingvo, ĉu en grandaj konferencoj, ĉu en personaj konversacioj. En 1906, partoprenis 800 personoj en Genevo; en 1907, ili estis 1400 el 30 nacioj; ĝis 1914, la sukceso grandiĝis, kaj la nombro kreskis, sed tiam eksplodis la Mondmilito dum kiu pereis multaj el niaj plej fervoraj pioniroj. Ĉiam, post tiu konflikto kaj post la dua, la flamo reviviĝis kaj atingis novajn pliajn celojn.

Dum la kongreso en Boulogne, franca pastro, Emile Peltier, faris jenan alvokon: pastroj de diversaj religioj esperantistaj, estigu nia lingvo inter ni kiel peranto por fratiĝo kaj kunlaborado al la universala frateco.

E. Peltier lernis esperanton en 1901, kaj, ekde 1903, li publikigis en la katolika ĵurnalo "l'Aube" (Tagiĝo) paĝon dediĉitan al Esperanto, kaj, baldaŭ li kreis la monatan revuon "Espero Katolika", kiu fariĝis poste la organo de IKUE fondita de Pastro Richardson en 1905.

La XX-a jarcento multe ŝanĝis nian vivmanieron, pere de multaj kaj gravaj materialaj progresoj. Ĉu ĝi vere kunportis ankaŭ humanismajn progresojn? Ĉu la novaj sciencaj rimedoj vere riĉigis la homajn kontaktojn? La oficialaj instancoj uzas teknikajn rimedojn, materialon, multekostajn taĉmentojn da tradukistoj en la gravaj internaciaj konferencoj, kaj estas same en la ekleziaj sindoj. Esperanto estas ankoraŭ en la periodo de pionira agado; tia paca batalo postulas nian praktikon ĉiutagan, per parolo, skribo, legado, per la uzado de la lingvo je la servo de niaj idealoj, per la klopodoj por enigi la instruadon de Esperanto en niajn rondojn, en niajn lernejojn, per ĉiuj formoj de informiloj, kaj precipe per agado celanta vekti inter la junularo la vokon al la komuna paca agado en universala frateco.

R.C.C.

JUDA PARABOLO

Em 325 p. K., rabeno Bun bar Hijja, fama doktoro, pri leĝo, mortis 28-jara. Liaj kolĝoj kunvenis por omaĝi lin. Jen la funebra preleĝo de rabeno Z'era

"Reĝo havis vinberujon; li dungis multajn laboristojn por labori en ĝi. Unu el la laboristoj superis la aliajn pro sia laboro.

Kiam la reĝo vidis, ke li superas la aliajn, li prenis lin per la manoj kaj manĝis kun li iren kaj reen.

Kiam vesperiĝis, la laboristoj alvenis por ricevi sian salajron. La supera laboristo ankaŭ venis kaj ricevis plenan salajron. La laboristoj ĵaluzis lin kaj diris: "Via reĝa Moŝto, ni laboris dum la tuta varma tago, dum li laboris nur du aŭ tri horojn. Tamen vi donis al li, kiel al ni, plenan salajron".

Respondis la reĝo: "Kial vi ĵaluzas lin? Li laboregis en du aŭ tri horoj pli ol vi dum la tuta tago".

Same rabeno Bun bar Hijja laboris dum 28 jaroj pli ol nun pli maljunaj kolegoj".

Laŭ la revuo "Christ, source de Vie"

+++++

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 8-a DE FEBRUARO 1987

La kunveno akurate komenciĝas je la 14.00 per komuna kantado de himno.

Ĉeestas: P-ro Bourdon, F-to Marmou, S-inoj Michau, Vincent, F-ino Preux, S-roj Bessière, Despiney, Colas, Pons.

Petis senkulpigon: P-ro Degrelle, malsana, kaj S-ro Villeneuve.

Post aprobo de la tagordo kaj de la raporto pri la lasta kunveno, S-ro Colas raportas pri la preparo de la kongreso en Bagneux. S-ino Vincent jam vizitis la paroĥestron; S-ro Colas baldaŭ vizitos la episkopon en Nanterre. La aliĝintoj ricevos la necesajn informojn ĝustatempe. Estas urĝe aliĝi, se oni ankoraŭ ne faris tion.

P-ro Bourdon diservos dum la nacia kongreso en La Gaillarde apud Fréjus. Oni ankaŭ invitos P-ron Ciccanti el Italujo.

Kvankam la membraro iom stagnas, la financoj estas bonaj. La alilandanoj kompreneble rajtas aniĝi; ili estos bonvenaj.

P-ro Bourdon informas, ke ekzistas en Lille kaj Valenciennes bibliaj Esperanto-studrondoj. Kiu estos la tria?

P-ro Degrelle tradukis pliajn kantikojn. Oni klopodos eldoni ilin, kiel eble plej rapide.

S-ro Colas sciigas, ke juna dominikano en Toulouse preparas studtaskon pri la historio de la katolika Esperanto-movado en Francujo. Dank' al nia arĥivaro, ni helpos lin per la necesa materialo.

Post preĝado, la kunveno finiĝas je la 16.00. La venonta okazos dum la maja kongreso en Bagneux.

+++++

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1986

| ENSPEZJOJ | ! | ELSPEZJOJ | |
|--------------------------|-------------------------|-----------------------|-----------------|
| Kotizoj | 4 265,00 | ! Bulteno | 4 415,73 |
| Donacoj | 1 670,60 | ! Korespondado | 639,90 |
| Rentumo ŝparkaso | 326,16 | ! Vojaĝoj komitatanoj | 1 562,00 |
| Deponoj ŝparkaso | 2 023,00 | ! Diversaj | 35,00 |
| Sumoj repagotaj | <u>1 563,50</u> | ! | |
| | 9 848,26 | ! | <u>6 652,63</u> |
| Pozitiva saldo | 3 195,63 | | |
| En la kaso la 1/1/1986 | <u>7 842,23</u> | | |
| En la kaso la 31/12/1986 | <u><u>11 037,86</u></u> | | |

+++++

NIA MEMBRARO

xxxxj Membroj bonfarantoj 1986: 6) F-ino ESPRIT (Hte-Marne)

Membroj bonfarantoj 1987: 1) S-ino GUILLOT (Oise); 2) S-ro BIRON (Italujo)

Novaj membroj 1987: 1) 2). G-roj VANGHELUWE (Nord)

Koran bonvenon!

FKEA-KONGRESO EN BAGNEUX 1-3/5/1987

La lokaj organizantoj renovigas sian inviton kaj insistas pri la graveco por la vivo de nia asocio, de tia jara manifestacio. Sed ĝi valoras nur se oni povas vidigi nian aktivecon ekstere de niaj randoj, kaj la plej bona pruvo estas la nombro de partoprenantoj parolantaj la lingvon inter si.

Se ni celas ĉefe la uzadon de Esperanto je la servo de la Ekleziô kaj de la Kredo, tamen ni devas ne flankenlasi la neceson de la varbado de novaj membroj inter la kristanoj.

Ni havas la ŝancon kunveni apud Parizo: ni vokas niajn anojn kaj amikojn de nia regiono; ili faru sian eblon por dediĉi tiujn printempajn tagojn al nia agrabla kaj utila kunveno.

Ni ankaŭ frate bonvenigas alilandajn amikojn.

Por ĉiuj informoj kaj aliĝoj, reprenu la septembran numeron de FKE. Nepré aliĝu antaŭ la 10-a de aprilo 1987.

Jen kelkaj indikoj por bone prepari la kongreson/:

1. Signifo, laŭ PIV, de la diversaj vortoj de la temo: "La rolo de la Sankta Spirito en nia esperantista vivo".
2. Rilatoj inter Jesuo kaj la Sankta Spirito (Joh.12,50;14,17)
3. Ĉefa funkcio de la Spirito (Joh.15,26;16,13)
4. Karismoj de la Sankta Spirito (I Kor. 12-14)
5. Aparta utileco de ĉiu el la sep donoj de la Spirito
6. A. Gardeil "Le St-Esprit dans la vie chrétienne" Ed. Cerf
7. A.M.Henry "L' Esprit-Saint" coll. Je sais-Je crois. Arthème Fayard

Ni legu, skribu kaj preĝu, por ke ni kapablu utile interveni dum la kongreso kaj per tio helpi la aliajn. Antaŭdankon.

L. BOURDON

xx

PRI KELKAJ SANKTULOJ

SANKTA KAZIMIRO, reĝo

La edziĝo de Kazimiro, reĝo de Pollando kaj grandduko de Litovio kun Elizabeta de Aŭstrujo okazis la 10-an de februaro 1454. Kiel tria infano el 13, Kazimiro naskiĝis la 3-an de oktobro 1458. Lia patrino zorgis pri religia kaj saĝa edukado. Ĉirkaŭ la 15-a jaro, Kazimiro eniris la politikon. Hungara delegitaro proponis al li la hungaran tronon. La knabon oni sendis kun armeo al Hungarujo por konkeri la reĝan tronon. Mathio, laŭrajta reĝo, staris kun armeo fronte al Kazimiro. La pola armeo retiriĝis. Tio profunde impresis Kazimiron. Li komprenis la vantecon de surtera grandeco kaj ekde tiam li sekvis vivon de preĝado kaj pentado, elstaris en pureco kaj kompatema amo kaj havis specialan kulton al la Dipatrino, kiun li esprimis per ofta preĝado de la Maria himno "Omni die die Mariae". La 4-an de marto 1484, li mortis pro pesto kaj estis entombigita en Vilnio.

En Pollando, S-ta Kazimiro estas unu el la plej amataj sanktuloj, patrono kontraŭ pesto kaj aliaj malsanoj, kaj por la juĝularo ekzemplo pri ĉasteco.

SANKTAJ PERPETUA KAJ FELICITA, martiriinoj

Ili vivis en norda Afriko, ĉirkaŭ Tuniso, komence de la 3-a jarcento. Kristanismo tie estis ankoraŭ juna, sed kreskis. Ni konas el tiu tempo la fervoran Tertulianon, la grandan episkopon Ciprianon kaj poste la kleran Aŭgustenon. Vibia Perpetua estis juna virino altklaŝa kaj patrino de fileto, kiam la imperiestro Septimio Severo malpermesis (en 202) kristaniĝi je mortpuno. Felicita estis sklavino, kiu tri tagojn antaŭ la martirmorto naskis infanon. Ambaŭ sanktuliinoj estis prepariĝantaj al la bapto. Ilia historio restis konservita pere de la martiraktoj, kiuj parte de la sanktuloj mem, parte de ĉeestintoj estas kompilitaj. La 7-an de marto 203, ambaŭ virinoj estis mortigitaj de sovaĝa bovino en la amfiteatro en Carthage. En la romia kanono de la S-ta meso, oni nomas ambaŭ. Rimarkinde estas, ke iliaj nomoj kunmetitaj formas la rekompencan por ilia heroeco: felicitas perpetua signifas: eterna feliĉego.

xx

Deziras korespondi: 1) KABWIKHU Robert Institut de la Ciza B.P. 7598 KINSHASA I
2) MIELUZENGI Kinshala Ecole secondaire Ciza B.P. 7598 KINSHASA I ZAIRIO

KULTURAJ ARANĜOJ 1987

- I. INTERNACIA RENKONTO DE INFANOJ--Praktika pedagogio (19-25/4)
- II. INTERNACIA AMIKA RENKONTO: libera programo, ekskursoj (14-30/6)
- III. PRELEGOJ KAJ KURSOJ: konversacioj, ekskursoj, vesperoj (2-16/7)
- IV. JUBILEA ESPERANTOLOGIA SEMAJNO (16-22/7)
- V. DIVERSNIVELAJ KURSOJ (23/7-13/8)
- VI. LERNADO KAJ PRAKTIKO DE ESPERANTO (13-30/8)

KONGRESO EN BAGNEUX RAJTIGILO (sendata al la sekretariino v.p. 1)

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo)
 ne povante partopreni la kongreson en Bagnaux, rajtigas
 reprezenti min, kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de FKEA.
 Antaŭ la subskribo, bonvolu ***** Dato kaj subskribo:
 permane skribi "Bon pour pouvoir"

VOĈDONILO

- 1. Ĉu vi aprobas la laboron faritan de FKEA? JES NE SINDETENO
- 2. Ĉu vi aprobas la finanĉan raporton? JES NE SINDETENO
- 3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj.

LAFARGUE Henri PREUX Georgette
 MICHAU Jeanne VINCENT Jeannine

INSTRUKCIOJ POR LA VOĈDONADO

Respondu la suprajn demandojn forstrekante la senutilaĵojn, enmetu la voĉdonilon (eventuale la rajtigilon) en koverton sen indiko. Enŝovu ĉi tiun koverton en alian, kiun vi sendu al la sekretariino antaŭ la 20-a de aprilo. Dorse de tiu dua koverto, skribu vian nomon. Ne sendu alian aĵon, ĉar tiun koverton oni malfermos nur en Bagnaux, dum la kongreso!

LA KASISTINA ANGULO

Vidinte la finanĉan raporton, vi eble opinias, ke FKEA estas tre riĉa, kaj ne plu bezonas la helpon de siaj anoj, en formo ĉu de kotizo (prefere de bonfaranto!) ĉu de donaco. Ĉu vi forgesis, ke ni ĵus eniris la jubilean jaron, kiun ni ja devas inde celebri? Tiucele, ni invitis P-ro Ciccanti diservi dum la Sankta Meso en La Gaillarde okaze de la franca kongreso, kaj kompreneble senpage akceptos lin tie. Por iel agi, necesas mono. Komparu la sumon enspezitan per la kotizoj kaj la sumon elspezitan por la bulteno... kaj konkludu mem. La bultenon ni volonte sendas al nepagipovaj fratoj en orienta Eŭropo aŭ Latinameriko, sed ne decas sendi ĝin al francaj membroj... kiuj "fororgesas" pagi. Do se vi volas plu ricevi FKE, tuj kontrolu ĉu vi pagis vian kotizon por 1987 (eventuale ankaŭ 1986!) Se ne, vi riskas nenion plu ricevi.

Se vi havas korespondantojn, kiuj dezirus ricevi FKE sed ne povas pagi, abonigu ilin, vi faros grandan servon al ili kaj helpos nin plibonigi la bultenon.

Se vi havas aliajn ideojn, sendu ilin!

ENHAVO

- 1.2. Bileto de la prezidanto
- 3. Juda parabolo
Protokolo de la komitatkunveno (8/2/1987)
Financa raporto (1986)
Nia membrao
- 4. FKEA-kongreso: invito, spirita preparado
Pri kelkaj sanktuloj
- 5. Pri Norvegujo
Nekonata psalmo (3)
Mia hejma urbo Nevers
- 6. Membraro IKUE (1987)
Alvoko al la sciencistoj
Informoj
- 7. Grésillon-aj programoj (1987)
FKEA-kongreso: rajtigilo, voĉdonilo
Kasistina angulo
- 8. Kotiztabelo

+++++

KOTIZTABELO 1987

IKUE kun "Espero Katolika" 90 F
 Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo) 30 F
 Geedza paro 40 F
 Infano ĝis 16-jara, pastro, religiulo(in)o 15 F
 Bonfaranto 150 F
 Dumviva membro 600 F

UFE kun "Revue Française" 195 F
 UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 200 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

+++++

Dépôt légal: 1er trimestre 1987 !! Polycopié par l' A. C. F. E.
 C.P.P.A.P. n° 62 532. !! Prieuré St-Martin
 Directeur: René-Claude Colas !! La Houssaye-en-Brie
 Directeur-délégué: !! 77610 FONTENAY TRESIGNY
 René-Jean Marmou !! FRANCE

* * * * *
 * * * * *
 * * * * *
 * * * * *
 * * * * *
 * * * * *